


# *Esperanto en Danio*

18-a jarkolekto • n-ro 2 • aprilo 2011



Claus Bruun (maldekstre) kun ĉiliaj samideanoj

## **Esperanto en Danio**

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### **Adreso de la asocio/prezidanto:**

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### **Kromaj estraranoj:**

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

### **Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 50 38 41 77 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### **Presado:**

DDFO

### **Adresŝanĝoj al:**

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.06.2011**

## **Enhavo**

Jarraporto de DEA pri la agado dum 2010.....	3
Ĝustigoj.....	12
La senpluma pepantaro.....	12
Internacia Esperanto-Tago....	14
Ĉilia renkontiĝo.....	15
Permakulturo.....	15
Debutas novaj E-filmetoj.....	16
Kopenhago.....	17
Næstved.....	18
Ålborg.....	19
La japana tertremo.....	20
Lasta informo de JEI.....	23
Esperanta retradio.....	23
Pri fervojoj en UK.....	25
Slovenaj Esperanto-poŝtmarkoj.....	25

# Jarraporto de DEA pri la agado dum 2010

## La jaro

La jaron karakterizis la decido inviti la 96-an UK en Kopenhagon. Tuj post la decido nia estraro adaptiĝis al tiu situacio kaj prenis la taskon de LKK, kompletigita per kelkaj pliaj personoj.

Ni havis regulajn monatajn kunvenojn kaj inter ili laboris pri la diversaj taskoj. De la CO ni ricevis komence la kongresan operaciaron kun 147 diversaj taskoj kiujn LKK devas plenumi, plejparte en kunlaboro kun CO kaj la KKS. Aranĝi universalan kongreson estas granda defio kaj laboro por ni, sed ni ege esperas ke la etoso kaj funkciado de la kongreso atingos la saman nivelon kiel la ĝisnunaj kongresoj, eĉ kun minimuma helpo de koncernaj danaj instancoj, kiel ekzemple nia turisma organizo al kiu ni devis forte emfazi ke la lingvo uzata por diversaj reklamiloj direktitaj al nia movado ne povas esti la angla.

Feliĉe okazas en ĉi tiuj monatoj sufiĉe grava ŝanĝo en la sinteno de oficialaj instancoj pri lernado de fremdaj lingvoj en Danlando. Fine de januaro mi ĉeestis diskutkunvenon pri nacia strategio pri fremdaj lingvoj. Ĉeestis la ministro pri scienco kiu en sia malferma paroladeto emfazis la grandan bezonon ke iaj lernantoj lernu fremdajn lingvoj, ĉar kiel ŝi inter alie diris: “75% de la homaro ne parolas la anglan lingvon!”, do estas grave ke ni povu komuniki internacie pere de pluraj fremdaj lingvoj. Pro mi estis vere granda ŝanĝo en la sinteno, ĉar mi memoras la sintenon de la antaŭa ministro por kiu la angla estis la sola bezonata lingvo. Dum la diskutkunveno mi enfazis la propedeŭtikan valoron de Esperanto kiel helplingvo por pli facile lerni aliajn lingvojn, kaj mi ankaŭ sendis skriban kontribuon tiusence. La Ministro fondis laborgrupon de 6 personoj kiuj dum printempo prilaboros proponojn pri la strategio, kaj DEA sendis nian kontribuon al la prezidantino de la grupo kaj al la Ministro proponante projekton kiu montros la propedeŭtikan valoron de nia lingvo. Ĉu ni sukcesos konvinki pere de niaj argumentoj estas tro frue imagi, sed gravas ke ni estu videblaj kaj informu pri nia ekzisto.

## **Informado**

La revuo Esperanto en Danio daŭre aperis 5-foje dum la jaro kaj ni klopodas daŭrigi la 5-neran eldonadon kun varia enhavo kaj interesaj bildoj de la aktivecoj dum la jaro.

La nova broŝuro de E@I estas tre utila varbilo precipe dum niaj ekspozicioj kaj elsendo al interesitoj.

En januaro okazis grava diskutkunveno kie la prezidantino informis pri la graveco de Esperanto kiel valora propedeŭtika kontribuo al lernado de fremdaj lingvoj, kiel supre menciite.

La 21-an de februaro Ileana Schröder prelegis pri Esperanto en la Altlernejo por aĝuloj en Hvidovre.

DEA partoprenis kiel kutime en la Foiro Krop-Sind-Ånd komence de februaro, kaj la Nordjutlanda klubo partoprenis en Ålborg en marto.

DEA ĉeestas regule la kunvenojn de la reprezenta komitato de la UN-Asocio.

## **Gazetartikoloj**

La gazeteltondaĵoj aperas regule en nia revuo, dank' al sindediĉo de Grethe Nielsen kiun ni elkore dankas.

Dum la jaro 2010 aperis en la dana gazetaro ĉirkaŭ 80 mencioj de Esperanto, el kiuj oni povas karakterizi kvaronon kiel pli-malpli hazardan. 16 mencioj estas rekta sekvo de agado de esperantistoj: Esperanto-skolen kaj la klubo en Næstved, Peter Weide en Melby, la nova vortaro. 12 mencioj estis kaŭzitaj de “rondaj” naskiĝdatrevenoj (Sven Ziegler kaj Tage Mølgård) kaj 6 de nekrologoj (Mogens Groth, Minka Jensen kaj Oliver Hansen). Rimarkindaĵo ĉi-jare estas ke 6 mencioj okazis lige kun aliaj planlingvoj (Volapuko, Interlingvao kaj Klingono). 6 mencioj estu klasitaj kiel leteroj de legantoj. En tiaj “malnovaj novaĵoj”, kiujn iuj gazetoj ĉerpas el siaj arkivoj, Esperanto estis menciita en 5. En la serioza semajngazeto Weekendavisen aperis longa artikolo pri planlingvoj en la porinfana sekcio, kaj Esperanto estis menciita en tri artikoloj pri la tradukproblemo en EU.

## **Instruado**

La ILEI-sekcio aranĝis dum la jaro jenajn kursojn: la 1-an de marto 2010 kurson por komencantoj kun 20 partoprenantoj, el kiuj kelkaj daŭre partoprenas en kurso por daŭrigantoj sub gvidado de Gosia Nitkowska. En septembro komenciĝis nova kurso por komencantoj kun 4 partoprenantoj sub gvidado de Bent Jensenius, same la 28-an de februaro ĉi-jare kun 4 partoprenantoj sub gvidado de Finn Østerbæk. La fakto ke ni nun havas kursojn de pluraj niveloj faciligas la direkton de la kursanoj al la ĝusta individua nivelo.

Aŭtune vizitis nin la respondeculo de la ILEI konferenco, nia konata gasto Radojica Petrović, kaj ni prenis la okazon aranĝi konversacian kurson.

La korespondan kurson sekvas kelkaj kursanoj, sub gvidado de Arne Casper.

## **Libroservo**

*Raportas Arne Casper*

La jaro 2010 estis elstara jaro por nia libroservo.

Komence de la jaro la pli ol 3-jara laboro pri la nova vortaro Dana-Esperanta estis kompletigita: 458 paĝoj kaj 34.013 kapvortoj. Ni ekis neriskemaj, sed la postulado estis surpriza inter niaj samideanoj, sed ankaŭ de multaj bibliotekoj. Dum nia jarkunveno en aprilo oni preskaŭ enviciĝis por ekhavi ekzempleron. La granda intereso de multaj bibliotekoj estis ankaŭ ege pozitiva. La unua eldono rapide elĉerpiĝis, kaj prizorgonte la bibliotekojn, la dua eldono tuj estis presita. Ankaŭ eksterlanden forvojaĝis nia nova vortaro, al UEA en Nederlando, Norvegio kaj Svedio.

Samtempe ni povas informi, ke la stoko de nia lernolibro Esperanto – den direkte metode de Stano Marček rapide malgrandiĝas – eĉ norvegaj samideanoj aĉetis malgrandan stokon en 2010.

## **Ĉefdelegita laboro**

*Raportas Arne Casper*

2010 estis la jaro kiam la nombro de individuaj UEA-membroj de Danio unuafoje preterpasis la magian ciferon 100 – la finrezulto estas 101 membroj.

Kompreneble la venonta Universala Kongreso en Kopenhago influis pozitive la evoluon kaj espereble ni daŭrigos venontjare tian bonan tendencon, ne riskante la malĝojigan ‘post-UK’-an efikon.

Ĉar UEA nepre bezonas pli ol nur ‘porkongresajn membrojn’, estas daŭre necese, ke ni estu la fidela fundamento de UEA ankaŭ post la kongreso!

## **Dana Esperanto-Junulara Organizo**

*Raportas Regin Larsen*

Dum la pasinta jaro DEJO je la 4-a fojo ĉeestis la Roskilde-Festivalon kaj ene de tiu festivalo organizis Esperantan renkontiĝon. DEJO estas unu el la asocioj, kiuj kunigas volontulojn por helpi dum la festivalo. La aranĝo estas senpaga por partoprenantoj kontraŭ 24 horoj da laboro kaj por ĉiu volontulo DEJO ricevas iom da mono. Parto de tiu mono estas uzata por manĝigi la partoprenantojn. Ĉi-foje pli ol cent homoj partoprenis en la DEJO-grupo el kiuj ĉ. 40 estas esperantistoj el diversaj landoj. La aranĝo pasis sukcese kaj ni preparas nin por la 5-a fojo. Dum la cetera jaro okazis ne-regulaj kunvenoj kun diversaj temoj (ekzemple farado de suko). Ekestis nova klubeto “Ludoklubo” kiu foje aranĝas futbalon kaj aliajn sportojn. Nuntempe okazas interalie preparoj pri la junulara programo dum la baldaŭa UK en Kopenhago.

## **Jarraportoj de la Klubo**

### ***Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago***

*Raportas Betty Chatterjee*

Membronombro: dum 2010 ni havis 62 membrojn inkluzive 1 honoran. Dum la jaro forpasis unu membro Ib Schleicher. Kvankam inter 10 kaj 25 personoj partoprenas la semajnajn klubkuvenojn, ni bedaŭrinde konstatas ke la membronombro malkreskas.

Studgrupo: Printempe la studgrupo gvidata de Bent Wiinberg finlegis la libron ‘Faktoj kaj Fantazioj’. Kvankam Bent en junio rezignis gvidi la studvesperojn ni daŭre studkunvenas legante la novelaron de Tim Westover ‘Marvirinstrato’.

Prelegoj kaj aliaj aranĝoj: Mi dankas al la prelegantoj kaj aliaj aranĝantoj kiuj dum la lasta jaro vigle informis, distris kaj kuraĝigis nin. La programo jam estis sufiĉe varia. Krom la prelegoj pri Martinus, la junulara agado, la Esperanto-Domo, la historio de fremda lingva instruado, faktoj kaj fantazioj pri Islamo, Irlando, Nepalo, August Krogh, kongresaj paroladoj de Zamenhof, reta komunikado, Oomoto, maŝintraduko, paco, mitoj pri sankta akvo kaj la Brita kongreso estis multaj aliaj aranĝoj. Ni aranĝis distrajn vesperojn en kiuj ni kantis, divenkonkursis, kvizumis, numeroludis kaj rolludis. Plue ni memoris gravajn okazaĵojn ekzemple la Tagon de Gepatraj lingvoj. Dum aliaj kunvenoj ni instigis unu la alian rakonti pri libroj, someraj travivaĵoj, kongresaj spertoj, videndaj vidindaĵoj, esperantisteco ktp. Dufoje ni aranĝis aŭkciojn, kies mongajnaĵojn ni donacis al la Fonduso por Esperanto-Domo. Dum la jaro ni plurfoje gastigis gastojn el Germanio kaj Norvegio. Ni aranĝis turisman klub-ekskurson en la urbo. Dum la Kopenhaga internacia tago ni partoprenis per budo. La lasta aranĝo de la jaro estis sufiĉe sukcesa Zamenhoftaga festeno. KEK-anoj kunlaborante tradukis libreton pri la historio de Kopenhago; espereble oni povos disdoni la tradukaĵon okaze de la Universala kongreso.

Estontaj planoj de nia klubo: ni daŭre klopodos laŭeble aranĝi aranĝojn, kiuj plaĉos al la membraro kaj laŭeble ni apogos la Esperantan agadon en Danio kaj en la Sunda Regiono. La konscio pri la defiaj aranĝoj en la jaro 2011 instigas al ni, ke ni koncentriĝu plibonigi la lingvan nivelon en la klubo. La temo de la ĉi-jara Universala kongreso kaj ankaŭ de UN estas “Dialogo kaj reciproka Kompreno”, kiu pli precize temas pri la intergeneracia kunlaboro. Dum la lasta jaro sufiĉe ofte kontribuis gejunuloj bonajn kontribuojn dum klubaj vesperoj, kaj espereble ili pli kaj pli venos en la klubon. Ni bezonas la junularon kaj ties komprenon pri la nova Esperantujo, kaj ili bezonas la maljunularon kaj ties komprenon pri la historio de la movado!

Fine mi volas danki la estrarojn de KEK kaj DEA, la klubaron kaj aliajn bonkorulojn ekstere de la klubo por la apogo, la bonhumoro kaj la pacienco.

## *Århus Esperanto-klubo*

### *Raportas Stanislaw Mielczarek*

Esperanto-klubo de Århus havas nun 27 membrojn. Bedaŭrinde kelkaj klubanoj rezignis pri la membreco, Luja kaj Tomislav Miletić elmigris al Kroatio, kie kelkajn monatojn poste Tomislav mortis. Wolfgang Kirschstein kaj Søren Dalmose transloĝiĝis al Selando.

Ni daŭre havas nian kunvenejon, sed la situacio estas malstabila. Afdeling for Sundhed og Omsorg, por ŝpari monon, nuligis luokontraktojn je la 4-a etaĝo, kie aktivis Venskabsforeningen kaj ankaŭ je la 3-a etaĝo, kie situis Kontoret kaj Forbrugerrådgivningen. Venskabsforeningen translokiĝos al Klostergade-Centret kaj la oficejo de Senior-Centret printempe translokiĝos al Værkstedet, kie estas libera oficejo. La reston oni ankaŭ translokigos, se Afdeling for Sundhed kaj Omsorg sukcesos trovi alian lokon por Senior-Centret kaj Langenæs Handicapcenter.

Århus Komunumo maldungis du kunordigantojn, inter ili Flemming Brandt-Nielsen, kiu estris Senior-Centret, kie ni kunvenas. Ni ne ĝojas pro tio. Flemming Brandt-Nielsen estis agrabla homo kaj favora por Esperanto.

En la pasinta jaro ni planis 9 kunvenojn, sed kelkaj ne okazis. Dum ili interalie Jonas Dalmose rakontis pri sia Esperanto-ekzameno, kiun li faris en Slovakio.

La celo de la somera ekskurso 2010 estis la insulo Samsø. Tiu tuttaga ekskurso, kiun proponis Søren Dalmose, estis tre interesa. Ni vizitis multajn vidindaĵojn. La vetero ne estis tro bona, sed niaj humoroj tamen estis bonaj.

En la aŭtuna-vintra sezono ni povis denove ekskursi al Samsø dank'al fotoj de Grethe Kvist kaj Erik Hjorth, kiuj somerferiis sur la insulo.

Mi volas ankaŭ mencii interesan okazintaĵon, kiu estis “Malferma domo” en Senior-Centret. Ĝi okazis sabate, la 20-an de novembro. La granda salono de la centro estis plenplena de la standoj, kiuj montris la aktivecojn de diversaj kluboj, aktivantaj en Senior-Centret. Ankaŭ nia klubo havis standon. Tio ne donis iun rezulton, sed tamen ni estis tie.

La jaron 2010 ni finis per Zamenhof- kaj Kristnaska festo. Ni kantis, aŭskultis amuzan historieton legantan de nia senlaca Henry Simonsen kaj –



kompreneble – ĝuis dank'al Agnete kaj Jørgen Kristoffersen benjetojn kun varma vino.

Dankon al vi ĉiuj por bona kunlaboro!

## *Esperanto-Unuiĝo de Næstved*

*Raportas Grethe Nielsen*

Dum 2010 ni sekvis la modelon de la pasintaj jaroj, nome ordinarajn studgrupojn, danlingvajn prelegojn, someran ekskurson kaj kristnaskan aranĝon.

Ni daŭre uzas la legolibron *Faktoj kaj Fantazioj*, posttagmeze aŭ vespere. La somera ekskurso iris al Rødving, al la fortikaĵo de Stevns kaj al Højerup – en tre forta vento.

Estis entute 5 danlingvaj prelegoj, menciitaj en la lokaj komunikiloj, tamen kun modera nombro de gastoj de la urbo. Temas pri: Tom Borgmann pri aktivigo de 'novdanoj' (januaro), Lene kaj Jan U. Niemann pri kulturaj travivaĵoj en Irlando (februaro), Mogens Rude Andersen pri stelaro (marto), Zita kaj Ole Blaust pri EU kaj revoj pri Jernbanegade 19 en Næstved (oktobro), Lizeta K. pri sia vivo kun kaj sen Esperanto (novembro).

La poŝta stampilo "Esperanto – et mellemfolkeligt sprog" bedaŭrinde ne funkciis dum 2010, kio ja estas des pli bedaŭrinda, ĉar la UK en 2011 okazos en Kopenhago. DEA ricevis sciigon, ke tiaj stampiloj ne plu uzeblas, sed antaŭ nelonge ni ricevis leteron, stampitan en Sydjylland Postcenter kun reklamstampo pri la 1300-jariĝo de la urbo Ribe – do ni estas komplete konfuzitaj!

Krom revizio kaj provlegado de certaj informaj tekstoj pri Kopenhago ni ne povas multon helpi al LKK; espereble tio ne bezonatas.

Nia Novaĵletero aperis kvinfoje, la estraro kunvenis unu fojon, nombro de aranĝoj estis 15 kun meza nombro de partoprenantoj je 8. La membro-nombro en 2010 estis 22.

Novaj seĝoj en nia klubejo estas pagitaj de la komuna kaso pri bontenado de la klubejo. La alia uzanto, Sathya Sai Baba, prizorgis la aĉeton. Kaj ili nun faras ankaŭ la purigadon de la kunvenejo.

DEFA daŭre uzas nian klubejon unu fojon monate dum la vintra sezono.

## ***Nordjutlanda Esperanto Klubo***

### *Raportas Ejnar Hjorth*

La kluba aktiveco daŭre estas precipe esperanto-kursoj. Nun estas kurso ankaŭ en Hvornum, Hobro.

Kiel kutime ni partoprenis en la foiro en Aalborghallen, kio donas al ni kontakton kun kelkaj, kiuj eble deziras lerni Esperanton. La klubo havas 29 membrojn, 7 el ili estas subtenantoj. La kotizo ni altigis ĝis 200,- kr/jare, sed 300 por samloĝantoj kaj 75 por junuloj ĝis la 30-a jaro, kaj por subtenantoj minimume 50,- kr. Dum la ĝeneralkunveno Rasmus Jensen proponis ke la kotizo por junuloj validu ankaŭ kiel membreco en la junularasocio. Ni havas nenion kontraŭ tio, sed ni ne scias la opinion de la aliaj kluboj kaj DEA.

Nia klubo havis viziton de ĵurnalisto kaj televida kameraisto. Ili deziris fari elsendon kaj artikolon pri Esperanto. Ili vizitis ankaŭ lernejon en Nørresundby, Skansevejens skole, kiu faris specialan klason de lernantoj el 4 aliaj lernejoj. Oni elektis lernantojn, kiuj deziras studi lingvojn. La instruisto, Christian Østerballe, deziris instrui al ili ankaŭ Esperanton, kaj invitis min helpi. La lernantoj unue lernis pri la franca en kvar semajnoj, kaj poste pri esperanto en unu semajno. La rezulto estis, ke la lernantoj klare observis ke esperanto estas multe pli facila ol la franca. La instruisto interesiĝas eklerni esperanton, kaj eble ankaŭ kelkaj de la lernantoj. – Estu optimisto!

Alia rezulto de tio estis dupaĝa artikolo en la gazeto NORDJYSKE Stiftstidende, pri intervjuo kun membroj de la esperantoklubo, kaj pri la vizito en Skansevejens skole. Poste oni faris televidan elsendon pri tio. Ĉio estis tre pozitiva.

## DEAs regnskab 2010

<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
Kontingent klubber	13.115,00	Administration	7.638,00
Individuaj	9.250,00	Gebyrer	400,00
DEJO	1.950,00	UEA & EEU konting.	2.412,00
Øvrige indt.	3.525,00	4% til Noll Fonden	432,00
Rente	4.642,00	Arrangementer	3.293,00
		Årsmøde	106,00
		EeD	7.718,00
I alt indtægter	32.482,00	Repræsentation	311,00
		96-UK	8.072,00
		Libroservo	<u>-7.818,00</u>
Årets resultat	9.918,00		22.564,00
	<u>22.564,00</u>	I alt udgifter DEA	<u>22.564,00</u>

<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	143.922,00	Egenkapital primo	270.702,00
Libroservo	44.052,00	Årets resultat	9.918,00
UEA konto	3.425,00	Egenkapital ultimo	222.560,00
Bankindestående DEA	88.969,00	DEJO kapital	109.520,00
Bankindestående DEJO	109.520,00	Forudb.kontingent	650,00
Debitorer	902,00		
	<u>390.790,00</u>		<u>390.790,00</u>

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den

Lars Kromann Jensen  
Revisor

Tara Gregers  
Revisor

## Ĝustigoj

En la pasinta numero ni priparolis s-ron Frank Jensen kiel “vicurbestro” – li kompreneble estas la ĉefurbestro de Kopenhago!

Ankaŭ enŝteliĝis eraroj en la nekrologo de Ib Schleicher. Li ne lernis Esperanton meminstrue, sed kiel lernanto de Peter Zacho. Krome, la koresponda kurso menciita tie estis gvidata ankaŭ de Peter Zacho, kaj Ib Schleicher korektadis la respondojn dum malsanperiodo de Zacho (Mogens Rude Andersen estis nur lernanto). Fine, la Andersen-tradukoj de Ib Schleicher estis pli fruaj, ol oni povus kredi laŭ la nekrologo.

## La senpluma pepantaro

Antaŭe la solaj pepantoj en la mondo estis birdoj! Ne plu! Nuntempe pro *Twitter* (Esperante Tvitero aŭ Pepejo) ĉiu kapablas fariĝi pepanto.

Kio estas Tvitero? Ĝi estas mesaĝilo por la sendo de etaj mesaĝoj, tiel nomataj pepaĵoj (*tweets*). Per ĝi homoj sendas inter si pepaĵojn de maksimume 140 signoj: literoj, helposignoj kaj spacoj. La uzantoj ricevas ĝisdatigojn per la Tvitera retejo, per telefonteksto aŭ retpoŝta mesaĝo ktp. Posedantoj de rafinitaj poŝtelefonoj senprobleme povas senĉese tujmesaĝi kaj reagi.

Kio estas ties celo? Jen senpaga informilo kaj kontaktilo. Tial por agemaj sed malriĉaj personoj kiel ekzemple mezoriantaj kritikuloj kaj esperantistoj pepado ŝajnas oportuna afero. Ĉu oni povas esprimi ion utilan per nur 140 signoj? Dependas je la kapablo de la pepanto. Gravus antaŭpripensi la celon kaj enhavo de la mesaĝo, kaj kritike elekti siajn vortojn. Jen ekcerzo de la arto de bona komunikado: oni skribas, kion oni intencas esprimi

uzante la plej precizajn vortojn.

Pri kio oni pepadas? Dependas de la interesoj de la pepantoj kaj la situacio. Hodiaŭ la 14-an de marto ĉiuj konscias pri la teruraj katastrofoj en Japanio, tial oni legas tiajn kiel la jenajn:

De japano: ‘Jes, antaŭ nelonge mi vizitis vendejon, kaj trovis la bretojn malplenaj!’ Tiu ĉi estas evidenta respondo al la demando de alilanda esperantisto: ‘Kiel fartas vi kaj la tokianoj? Mi legas ke la vendejoj malplenas.’

La eksplodoj en la nukleuoj pripensigas Germanan esperantiston, kiu skribis: ‘La germana kancelierino blekas kiel kokina panjo. Tute ne bonvenas problemoj pri nuklea energio en jaro plena de gravaj elektoj.’

Aliaj ripetas siajn marotojn. Ekzemple estas iu, kiu ĉitage citadas zamenhofajn proverbojn, kaj interalie li skribis: ‘Ne ekzistas honoro sen laboro’ kaj ‘Ne timu tranĉilon, timu babilon’.

Redaktoro demandas: ‘Kiu volas skribi artikolojn en #Esperanto por retgazeto? Bv kontaktu min.’ Certe mi ne kontaktos lin! Kiu fidus je redaktoro kiu dufoje gramatike eraras en tiel eta anonco? Ĉu vi hazarde trovas la erarojn?

El persona vidpunkto dufoje mi jam spertis, ke Tvitero malgrandigis mian mondon. La unuan fojon amikino el Usono, kun kiu mi amikiĝis la 11-an de septembro 2001 en Oksforda trinkejo, kontaktis min per Tvitero post kiam dum multaj jaroj ni maltrafis unu la alian kaj estis senkontaktaj. La duan fojon mi ricevis pepaĵon el familiano de mia eksedzo, kiun mi renkontis antaŭ 29 jaroj en Kolkato kiam li estis 12-jaraĝa. ‘Ĉu vi memoras min?’ Li demandis. Ho jes, mi certe memoris lin, kaj revenis en mian kapon tiom da bildoj pri kiuj mi eble iam rakontos al vi.

Ĉu vi estas pepema aŭ scivolema pri la agado de la senpluma pepantaro? Se jes, vizitu la hejmpaĝon <http://twitter.com/>.

*Betty Chatterjee*

P.S. Sur la sekva paĝo estas ekzemplo de aplikado de Tvitero:

# tutmonda twitter agado



## **Internacia Esperanto-Tago**

Esperanta ‘Twitter’-tago okazos je la 26a de julio, la datreveno de la lanĉo de la Unua Libro. Ni esperas ke vi povos partopreni – se jes bonvole pepu je tiu tago, kaj marku per #Esperanto.

La celo estas antaŭenigi Esperanton reklamcele.

Detaloj estas legeblaj en <http://www.facebook.com> – serĉu per “tutmonda twitter”.

Esperable iuj el Danio povos partopreni.

*Tutmonda TwitterAgado por Esperanto*

## Ĉilia renkontiĝo

Nia juna membro de DEJO Claus Bruun studas socian edukadon kaj elektis lastjare nekutiman staĝejon de sia edukado elektante la sud-amerikan landon Ĉilio, kie li loĝis dum 6 monatoj.

La staĝon li pasigis en infanĝardeno kaj en infanbiblioteko de Valparaiso. Dum sia restado tie, li prenis la okazon pasigi kelkajn horojn kun junaj esperantistoj. Li ekkonis ilin post iom da tempo, kaj ili decidis renkontiĝi en kafejo en la urbo Vina del Mar kiu situas tre proksime de Valparaiso.

Al Claus estis la unua fojo de kiam li esperantiĝis en 2008 ke li renkontis alilandajn esperantistojn. Lia fianĉino Alejandra, kiu sciis nenion pri nia lingvo antaŭ ilia konatiĝo, ĉeestis la kunvenon, ĉar ŝi volis aŭdi pli Esperanto. Unu el la ĉeestantoj kunportis Esperantan flagon, kaj Claus cerbumis ĉu la aliaj gastoj de la kafejo entute rekonos la flagon.

La junuloj interŝanĝis spertojn pri la Esperanta kulturo en Ĉilio kaj la ĝenerala movado. Kelkajn tagojn post la renkontiĝo unu el la junuloj, Rodolfo estis intervjuita en la televido pri Esperanto. La 6-monata restado en Ĉilio estis por Claus tre interesa kaj li rakontas ke li lernis multon pri la kulturo kaj institucioj de la lando.

## Permakulturo

Permakulturo estas terprilaboraj teknikoj kiuj celas imiti la naturajn ekosistemojn kaj certigi daŭripovan agrikulturon por konstante. La koncepto ekestis fine de la 70'aj jaroj rezulte de kunlaboro inter du aŭstralianoj. La lasta numero de la revuo "Tidsskrift om Permakultur", eldonata de la firmao "Lev bæredygtigt" (vivi daŭripove), enhavas artikolon de pli ol du paĝoj pri Esperanto, skribitan de la redaktoroj Mia Illeris kaj Esben Schultz. Ili vidas klaran konkordon inter la celaroj de permakulturo kaj de Esperanto. Ili proponas Esperanton kiel "novan elementon de la kultura revolucio pri kiu laboras la permakultura movado". Videblas ilia retpaĝo per la adreso [levbaeredygtigt.dk](http://levbaeredygtigt.dk).

## Debutas novaj E-filmetoj

FORT COLLINS, KOLORADIO, USONO.

Post jarlonga studado kaj laborego, Simono KEITH sukcesis diplomigi pri klasika animacio ĉe la vankuvera filma stud-ejo (Vancouver Film School) en Brita Kolumbio, Kanado. Post intensa eduko pri la principoj kaj fundamentoj de animacio, li dediĉis pli ol kvar monatojn al kreado de filmo tradicie desegnita sur papero. La rezulto estas Ĉapeloj, la unua animacia filmo en Esperanto. Li tuj poste kreis plian filmon, Neĝuloj, en nur kelkaj semajnoj uzante komputilajn ilojn.


Ambaŭ filmoj debutis ĉe lia diplomiga ceremonio, la 17-an de decembro, 2010. Proksimume dek esperantistoj venis por spekti. La 10-an de februaro, Ĉapeloj gajnis premion en loka filmkonkurso en Fort Collins.

Pliaj informoj baldaŭ aperos inter la paĝoj de Kontakto, numero 241 (2011:1). Tie eblos legi detalan intervjuon kun Simono, lukse ilustritan per skizoj, bildoj, kaj fotoj.

Por spekti ambaŭ filmojn rete, bonvolu viziti la blogon de Simono:

<http://cxapeloj.blogspot.com> ➡ kun ikso!

*Simono Keith*





## Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, [chatterjeebetty@hotmail.com](mailto:chatterjeebetty@hotmail.com). La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas normale **ĉiun lundon** ekde la 19:00 horo en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV. Vespermanĝo eblas en la kulturdoma kafejo. Ni troveblas ankaŭ en Facebook ĉe “Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo”.

### Programo

#### *Aprilo*

11-a: Pri ekzamenoj, kun filmeto.

18-a: Rolo-luda vespero.

25-a: Fermita pro la pasko!

#### *Majo*

2-a: **Danlingva** prelego de Ole Stig Andersen pri [sprog museet.dk](http://sprog museet.dk) (la lingva muzeo).

9-a: Eŭropa Tago

16-a: Kviza vespero.

23-a: Promena konversacia rondo – ie en la urbo.

30-a: Studgrupo

#### *Junio*

6-a: Karen kaj Finn parolos pri marioneta teatro.

13-a: fermita pro la pentekosto.

20-a: Ni ekskursos en la urbo esperante, ke ne malvarmos kiel pasintjare.

La Esperanto-Kulturgrupo invitas al nekutima kunveno merkredon, la 13-an de aprilo je la 19.30 horo en Medborgerhuset, Danasvej 30B, 2-a etaĝo, lokalo 1. Frederiksberg (aŭtobuso n-ro 29 aŭ per metroo al stacio Forum): La Esperanto-Kulturgrupo 2001-2010 - perspektivoj, instigoj kaj kulturaj inspiroj.

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: [eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk). - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝohoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj. Rigardu ankaŭ la hejmpaĝon: [www.esperanto-i-naestved.dk](http://www.esperanto-i-naestved.dk).

Okazos:

Ve 08.04 je 19.30: Sezonfina aranĝo kun manĝeto, trinkaĵo kaj ujutno.

Kaj tio estas la lasta vendreda kunveno. Iom post iom vendredajn vesperojn oni pasigas en la sino de la familio, kaj la televidaj stacioj dissendas popularajn programojn.

Tial ek de la venonta sezono, kiu por ni komenciĝos en septembro, **ni kunvenos mardojn**. Studgrupoj posttagmeze, aliaj programoj vespere.

Ni planas someran ekskurson al Odense, sabaton la 20an de aŭgusto.

**Okazis:**

04.02: Danlingva prezento de vizito al la Feroaj Insuloj fare de Lene kaj Jan Niemann. Belegaj surekranaj fotoj kaj granda nombro de spektantoj. – 18.02: Ĝenerala kunveno sen tro da sensacioj. – 22.02. kaj 15.03: Diligenta cerblaboro pri ĉapitroj de F+F. – 04.03: Pastro Torben Petersen rakontis danlingve pri siaj travivaĵoj en Afganio, kie li servis kiel pastro. Eminentaj rakontanto kaj informoj pri la sensenca milito. Tro malmultaj aŭskultantoj, parte pro ŝajna bojkoto de la lokaj medioj.

## Ålborg

***Jen novaĵo kiun Ejnar Hjort raportas:***

Nia klubo havis viziton de ĵurnalisto kaj televida kameraisto. Ili deziris fari elsendon kaj artikolon pri Esperanto. Ili vizitis ankaŭ lernejon en Nørresundby, Skansevejens skole, kiu faris specialan klason de lernantoj el 4 aliaj lernejoj. Oni elektis lernantojn, kiuj deziras studi lingvojn. La instruisto, Christian Østerballe, deziris instrui al ili ankaŭ Esperanton, kaj invitis min helpi. La lernantoj unue lernis pri la franca en kvar semajnoj, kaj poste pri esperanto en unu semajno. La rezulto estis, ke la lernantoj

klare observis ke Esperanto estas multe pli facila ol la franca. La instruisto interesiĝis eklerni Esperanton, kaj eble ankaŭ kelkaj el la lernantoj.



Alia rezulto de tio estis dupaĝa artikolo en la gazeto NORDJYSKE Stiftstidende, pri intervjuo kun membroj de la esperantoklubo, kaj pri la vizito en Skansevejens skole. Poste oni faris televidaĵon, kiu dum kelka tempo restis sur la retpaĝo de la gazeto.

## Paperaj gazeteltondaĵoj

*Februaro 2011:*

Jernbanefritid: “Hvad laver DEFA?”

Jyllands-Posten: Granda foto, sur kiu “Esperanto – det internationale kultursprog” inter aliaj aperas

Politiken Kultur: ”Det er jo synd for...”, Esperanto menciita

Weekendavisen: Fingerspitzengefühl, Esperanto menciita

Politiken: Krucvortenigmo

*Marto 2011:*

Sjællandske, Næstved, mencias prelegon de Torben Petersen

Jernbanefritid: København 2011 – esperanto i praksis

Hjemmet: Krucvortenigmo

Ni daŭre insiste instigas vin sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Precipe en la nuna, kongresa jaro devus ja aperi abundo da mencioj pri niaj agadoj!

## La japana tertremo

*En marto, kiel konate, okazis la plej granda tertremo de la japana historio. Nia tre konata samideano Hori Jasuo sendis rete taglibron pri siaj impresoj. Ni elektis eldoni lian unuan impreson pri tiu terura fenomeno.*

Je la 14a kaj 46 minutoj la 11an de marto 2011 okazis la plej granda tertremo en nia historio.

Kiam ĝi okazis, mi estis en la najbara poŝtoŝeĉejo por sendi poŝtaĵon al mia brazila amiko. Kiel kutime la juna poŝtistino kuris al la kesto, en kiu ŝi konservas novajn poŝtmarkojn por mi. Mi estas poŝtmarko-amanto kaj eĉ sen mia mendado ŝi konservas nove emisiitajn poŝtmarkojn por mi. Ŝi kunportis kaj ekmontris tiujn kaj komencis babili, tiam mi sentis teruran movon de la planko. Ĝi moviĝis malrapide kiel sur granda ondo kaj daŭris longe, eble unu minuton. Kutimaj tertremoj skuas delikate kaj tuj ĉesas, sed tiu ĉi tertremo estis ne normala. Mi sentis min terurita. Troviĝis kelkaj homoj en la oficejo kaj ĉiuj rigardis ĉirkaŭen kun maltrankvila mieno. Mi kaŝis min sub la tablo, sed aliaj nur daŭre staris. “Malnormala tertremo!” “Povis okazi granda tertremo ie en Japanio!” “Mi neniam spertis tian grandan tertremon!”, ĉiuj eldiris siajn opiniojn. Dume okazadis malgrandaj tertremoj kaj teruris nin.

Mi loĝas en la urbo Maebaŝi, 100 kilometrojn nord-okcidente de Tokio, meze de la Honŝuu-insulo. Ĉi tiun urbon malofte atakas tertremoj, malofte atakas tajfunoj. Ni estas eĉ fieraj pro la sekureco de mia gubernio. Oni diras, ke niaj gubernianoj estas plej malbone preparas sin kontraŭ eventualaj grandaj katastrofoj. Tial mia unua penso estis, ke ie okazis granda tertremo, eble en la najbara gubernio Niigata, kie antaŭ kelkaj jaroj sinsekve okazis grandaj tertremoj. Tamen la televido en la poŝtoŝeĉejo anoncis, ke ĝi okazis en la regiono Toohoku.

Mi ĉesis aĉeti poŝtkartojn, ĉar la oficistino estis tiel ŝokita, ke ŝi ne povis plu labori. Mi tuj hastis al mia 93-jara patrino, kiu loĝas sola 300 metrojn for de la oficejo. Hejme ŝi sidis trankvile. Ŝi diris, ke kiam okazis la tertremo ŝi apogis sin, tenante la pordon. Mi ĉirkaŭrigardis kaj kontrolis, ĉu okazis io en la domo. Mi nur trovis kelkajn bildojn kliniĝintaj, sed neniu alia nekutimaĵo estis trovebla.



Mi revenis hejmen. Mia edzino vidis televidon pri la tertremo kaj ĉirkaŭ ŝi estis falintaj pupoj. La televidilo estas metita en la libroŝranko kaj sur la supra breto estis montritaj multaj diverslandaj pupoj, meze de kiuj sidis la pupo de Zamenhof. Plejparto de tiuj falis sur la plankon kaj d-ro Zamenhof staris sur sia kalva kapo. Ankaŭ en aliaj lokoj pupoj falis kaj bildoj kliniĝis, sed ne estis okazinta serioza afero krom la nefunkcio de gaso-sistemo. Ĝi havas kontraŭtertremajn sistemon kaj aŭtomate haltis. Do mi eksteren iris kaj refunkciigis ĝin.

Tamen mia amiko, kiu loĝas en alia kvartalo de mia urbo, skribis jene: “Ĉi tie elektro ne funkciis. La granda strato, kiu kutime estas lumega kun multaj vendejoj, estis tute malluma, nur kun lumoj el aŭtomobiloj. Je la 1-a kaj 45 minutoj matene elektro ekfunkciis, sed pro maltrankvilo mi ne povis bone dormi.”

Poste mi vidadis televidon ĝis mia enlitiĝo noktomeze. Unue televido montris la alvenon de cunamo en la riveron Natori apud la urbego Sendai. La grandega, blanka ondo alproksimiĝis al la buŝo de la rivero kaj rapide supren penetris. Ĝi devojiĝis el la rivero kaj glutadis belajn kampojn, kiujn oni kultivis generacion post generacio. La pintoj de la cumano estis kvazaŭ langoj de drako kaj senkompate damaĝis tiujn.

Sekve televido montris cunamon, kiu enpenetris en la flughavenon Sendai, kiu situas tuj apud la maro, do la ondego facile disvastiĝis en la tuta tereno de la flughaveno.

Televideo montris incendion en la benzinujoj en la golfo de Tokio.

Kaj la plej kortuŝa estis la bildo en la urbo Kesenuma. Grandaj ondoj kuris en la havenan urbon, ŝovante kaj englutante ĉiujn en sia vojo, kaj baldaŭ la ondo reen kuris. Rigardante tiun bildon, mia edzino ploregis, ĉar domoj flosantaj koliziis kontraŭ la fosto kaj momente pecigite malaperis. Certe ne estis homoj en la domo, sed ĉio perdiĝis, kion la loĝantoj amas kun sia kara memoro.

Alia terura afero estas difekto de la nuklea centralo de Hukuŝima, kiu situas ĉe la maro en la gubernio Hukuŝima. Laŭ la registaro, la funkcio de akvo-liverado por malvarmigi la nukleaĵon estis difektita. Vespere la registaro ordonis la evakuon de la loĝantoj ekster la radiuso de 3 kilometroj. En Japanio estas ĉirkaŭ 60 nukleaj centraloj, kaj la elektraj kompanioj ĉiam insistis, ke ili konstruis tiel forte tiujn centralojn, ke ili povas rezisti kontraŭ la plej fortaj tertremoj, sed jam en 2007 en la tertremo en la gubernio Niigata unu centralo estis difektita, kaj denove tiun ĉi fojon la alia. Ĉu la kompanio povos daŭre insisti la sekurecon de la nukleaj centraloj en la vulkana insularo Japanio?

Vespere en Tokio multaj homoj havis malfacilon. Ili ne havis rimedon por hejmeniri, ĉar ĉiuj transportad-servoj haltis. Multaj atendis buson, sed ĉiuj stratoj estis plene ŝtopitaj. Trajnoj ne funkciis. La registaro rekomendis, ke homoj ne revenu hejmen kontraŭ malfaciloj, sed restu kaj tranoktu ie en sekura loko. Ĝi malfermis lernejojn kaj publikajn halojn por tiuj nereirpovantoj. Mi multe kompatis ilin, ĉar ankaŭ mi povus esti inter ili. La 10-an mi revenis hejmen el Nepalo. Se mia reveno estus unu tagon malfrua, mi estus envolvita en tiu kaoso kun granda valizo. Mi estis bonŝanca, sed eble estis multaj malbonŝanculoj, kaj precipe mi timis pri eksterlandaj turistoj en Tokio. Ĉu japanoj bonkore traktis ilin?

Ĝis noktomeze la nombro de la mortintoj estis ĉirkaŭ 60, sed mi antaŭvidis, ke la nombro superos 1000, ĉar informoj el diversaj urboj ne atingis la registaron. Laŭ la bordo de la Pacifika oceano situas multaj malgrandaj havenoj funde en golfetoj, kaj tiuj certe estas tre malfortaj kontraŭ tiu granda cunamo. Mi volus helpi la suferantojn, sed mi havis neniun rimedon, do mi kun malĝoja sento enlitiĝis.

Pri la tertremo la registaro klarigis, ke la skalo estis 8,8 gradoj, la plej granda tertremo en nia historio. Laŭ la klarigo de iu televida stacio, troviĝas 4 nestoj de tertremo laŭ la bordo de la regiono Toohoku kaj ĉi-foje

ĉiuj kvar samtempe aktivis. Neniu sismologoj antaŭvidis tion. Pro tiu grandskaleco ĉiuj orientaj kaj nordaj gubernioj, de Tokio al Aomori, ricevis damaĝon. Eĉ en mia gubernio unu virino mortis pro falinta tegolo.

## **Lasta informo de JEI**

La konataj 78 esperantistoj en la regiono estas sekuraj, de la granda tertremo kaj cunamo en la nordorienta parto de Japanio en la 11a de marto.

La tertremo tamen perdigis en Japanio pli ol dek mil vivojn, kaj ankoraŭ pli ol deksep mil vivoj ne estas trovitaj. Dume, pli ol 240 mil ankoraŭ loĝas en provizoraj rifuĝejoj, kaj pli suferas je manko de provizaĵoj, aŭ vivas timigite de la troa elŝpruco de radioaktivaj falaĵoj el atomcentraloj.

En tia situacio, ni dankas multajn kuraĝigajn vortojn el ekster Japanio. Aŭdiĝas voĉoj mone helpi japanojn de bonvolaj esperantistoj. Sed kiel skribite supre, ĝis nun damaĝo de la japanaj esperantistoj estas relative ne tro severa, kompare kun tiu de la pli severe damaĝitaj personoj en Japanio. Tial ni petas, ke vi bonvolu turni viajn bonajn volojn ĝenerale al la damaĝo, per vialandaj organizoj, kiel Ruĝa Kruco. Sed se iu sendos monon (ekzemple pere de UEA-konto), ni JEI danke uzos ĝin por la japanaj esperantistoj en la damaĝitaj regionoj.

Ni antaŭdankas vian komprenemon.

*SIBAYAMA Zyun'iti,  
la Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto*

## **Esperanta retradio**

La pli ol 50-jara historio de la Esperanto-redakcio de Pola Radio estas finita. La lasta elsendo estis publikigita en la reto la 31-an de januaro 2011, kaj pliaj elsendoj ne okazos. La estraro de Pola Radio decidis, ke la sola dungito de la Esperanto-redakcio, Gabriela Kosiarska, ekde nun havu aliajn taskojn.

Esperantlingvaj sonraportoj el Pollando tamen ne malaperis. Ekestis nova son-programo, lanĉita per la Facebook-grupo “Amikaro de Pola Radio en

Esperanto, APRE” – danke al la persista laboro de Barbara Pietrzak kaj ŝiaj helpantoj. Tiu interreta podkasto nun estas aŭskultebla kaj elŝutebla de iu ajn ĉe la adreso: [retradio.posterous.com](http://retradio.posterous.com).

Entute estas kreskanta nombro da Esperantaj retradiaj stacioj:

- Esperanto-muziko ĉe Radio Vinilkosmo

Ĉu vi ŝatas Esperantan muzikon? Ĉu vi volas aŭskulti kantojn el la novaj Esperantlingvaj sondiskoj? – Tiam aŭskultu do ofte la programon de Radio Vinilkosmo, kiu estas ĝuebla kiel subkanalo de Esperanto-TV ĉe: [esperanto-tv.com/vinilkosmo/](http://esperanto-tv.com/vinilkosmo/)

- Voĉoj el Japanio

Je 11.01.2011 estis lanĉita la 1-a elsendo de nova podkasto: “Voĉo el Japanio”, pli-malpli semajne kompilita, kaj prizorgata de Salih Zakirov. La podkasto okupiĝas ne nur pri japaniaj politikaj kaj movadaj eventoj, sed ankaŭ pri kelkaj Esperantaj lingvaj aferoj. La “voĉo el Japanio” estas aŭskultebla ĉe [vej.posterous.com](http://vej.posterous.com)

- Varsovia Vento produktas maloftajn, sed longajn kaj interesajn dissendaĵojn pri la vivo en junulara Esperantujo: [podkasto.net](http://podkasto.net)
- Malpli longa, pli ofta, sed same juna estas la “Radio Verda” de Arono kaj Karlina el Vankuvero, Kanado: [radioverda.com](http://radioverda.com) .
- [esperanto-tv.com/radio/](http://esperanto-tv.com/radio/) – projekto de Aaron Irvine
- [podkastaro.org/](http://podkastaro.org/) – aranĝita de Wilfred Hughes

Lastatempe aperis eĉ du retejoj, kiuj ne nur listigas la unuopajn songazetojn, ne nur aŭtomate aldonas al sia listo la freŝe aperantajn novajn numerojn de Esperantaj songazetoj, sed danke al la aŭtomatigebla prilaboro de RSS-fluoj, ili montras eĉ la enhavon de tiuj lastaj numeroj. Ne plu do oni povas argumenti kontraŭ la ne-aŭskultado, ke oni ne memoras aŭ ne scias la retajn adresojn de la unuopaj son-materialoj.

Ligilo al unuigita podkasto de Esperanto-elsendoj:

[www.rssmix.com/u/1822869/rss.xml](http://www.rssmix.com/u/1822869/rss.xml)

Bonan aŭskultadon!



## Pri fervojoj en UK

Voko al fervojistoj, fervoj-amikoj kaj –interesuloj:  
Fervojfaka ekskurso okazos dum la 96a UK merkede, la 27an de julio.  
Ni vizitos la kopenhagan Metro-kompanion.

Programo:

Gvidata vizito en la trajnpretiga centro ĉe Metro-stacio VESTAMAGER (du Metro-staciojn for de BellaCenter, kie okazos la UK). Poste ni iros al la centro de Kopenhago, kie ni vizitos kelkajn lokojn, kie oni momente laboras kaj konstruas por la nova Ringlinio.

Pliajn kaj detalajn informojn ni donos poste – en Dana Fervojisto, en IF kaj en hejmpaĝaro de DEFA ([www.jernbanceesperanto.dk](http://www.jernbanceesperanto.dk)) kaj IFEF (<http://ifef.free.fr/spip/>).

Amike en la nomo de DEFA – Jan U. Niemann, prez.

Jan & Lene Niemann \* Hovedvagsstræde 9E, 1. \* DK-3000 Helsingør  
retpoŝte [niemann@kabelmail.dk](mailto:niemann@kabelmail.dk)

## Slovenaj Esperanto-poŝtmarkoj



Omaĝe al 20-jara jubileo de Slovenio kiel memstara ŝtato, Fervojista Esperanto-Societo en Maribor mendis ĉe la slovena poŝto markojn. Samtempe la celo estas informi la homojn pri la Esperanta movado ĉe fervojoj.

Kompleto konsistas el du markoj: valoro “A” por enlanda kaj valoro ”C”. La kompletan oni povas mendi ĉe la adreso: Esperanto, p,p. 123, SI-9220 Lendava, Slovenio aŭ ĉe la reta adreso: ”[fes.maribor@amis.net](mailto:fes.maribor@amis.net)”

[Ret-Info]



Silezia Esperanto-Asocio ( str. Dubois 3 /  
1, 50-208 Wrocław, Pollando),  
invitas al la

## **44-a Internacia Esperanto–Feriado**

kaj la samtempa

## **2-a Filma Esperantista Feriado,**

**kiuj okazos de la 6-a ĝis la 14-a de  
aŭgusto 2011.**

Jam la sekvan fojon ni invitas vin al Szczawno Zdrój – unu el la plej malnovaj kuracurboj en Pollando, kiu ravis nin per sia ĉarmo, multaj eblecoj aktive pasigi la tempon kaj gastamo de ĝiaj loĝantoj, urbestraro kaj lokaj esperantistoj.

Ni proponas ripozi en la loko, kie en 1912 kuracis sin L. L. Zamenhof.

Ni jam trovis kelkajn liajn spurojn, helpu trovi la aliajn. Ni bonvenigas ĉiujn partoprenontojn kunkreadi programon de la feriado. Invitu viajn amikojn kaj konatulojn! Ili ĝuos ferii en Szczawno Zdrój.

Dum la restado ni ofertas:

- lingvokursojn por komencantoj kaj progresantoj,
- atrakciajn turismajn ekskursojn,
- komunajn kantadon, dancadon kaj bivakfajrojn,
- lokajn atrakciojn, i.a. koncertojn en kuracdomo, dancadojn en kafejoj,
- eblecon profiti la kuracprocedojn,
- filmojn kaj prelegojn de Roman Dobrzyński,
- sanktan meson en Esperanto.

Kosto kaj loko de la Feriado:

La prezo 650 PLN (ĉ. 170 EUR) por 2-3-persona ĉambro kun lavujo, aŭ 750 PLN (ĉ. 195 EUR) por 2-3-persona ĉambro kun banejo, ampleksas kostojn de la:

programo, tuttaga nutrado, loĝado en ripozdomo ”Magnolia” – la modesta sed tre gastama loko, kie oni rajtas kunhavi sian dombeston.

Kondiĉoj de la partopreno:

1. Plenigitan aliĝilon oni devas sendi ĝis la fino de aprilo laŭ la adreso: Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3/1, 50-208 Wrocław; aŭ rete: [vroclavo@poczta.onet.pl](mailto:vroclavo@poczta.onet.pl) aŭ [pomer@wp.pl](mailto:pomer@wp.pl)
2. Oni devas antaŭpagi 200 PLN (60 EUR) al la konto: 90 1940 1076 3026 8339 0000 0000 (eksterlandanoj povas pagi surloke). La antaŭpago ne povos esti redonita kaze de rezigno post la 1-a de julio.
3. Telefonan informon oni povas ricevi ĵaŭde en la horoj 17:30 - 20:00, tel. +48 71 3296954.

Eblas cedi sian aliĝon al alia persono.

---

## **ALIĜILO**

al 44a Internacia Esperanto-Feriado (2-a Filma Esperanto-Feriado) en Szczawno-Zdrój kiu okazos de 6.08. ĝis 14.08.2011.

Antaŭnomo kaj

nomo: .....

Adreso: .....

Ret-adreso: .....

Tel.: .....

Naskiĝdato: .....

Mi volas loĝi en:

2-3-persona ĉambro kun banejo

2-3-persona ĉambro kun lavujo

1-persona ĉambro kun banejo (ĉ. 245 EUR) – (nur post antaŭa interkonsento, ĉar en ripozdomo ne ekzistas 1-personaj ĉambroj)

Mi intencas partopreni en la kurso por: komencantoj/progresantoj

Mi preferas manĝi vegetare: jes/Ne

Mi volas loĝi kun:

Mi intencas riĉigi programon per:

*Dato:* .....

*Subskribo* .....

---

# “Krop-Sind-Ånd” en Aalborg



Gert Pedersen, Ina Busch, Karina Bredelle kaj Rasmus Høyrup-Jensen ĉe nia budo en la foiro

